# ?inio anoncis punojn por homoj kaj entreprenoj britaj




Pekino, mar 26 (RHK) La ministerio pri eksteraj rilatoj de ?inio informis pri la decido apliki punojn kontra? na? personoj kaj kvar institucioj britaj pro ilia disvastigo de mensogoj kaj falsaj informoj pri la situacio en la okcidenta regiono de Xinjiang, la? raportis la informagentejo Reuters.

Inter la sankciitaj homoj estas la eksgvidanto de la Konservativa Partio Iain Dunca Smith kaj la Komisiono pri Homaj Rajtoj de tiu partio.

La regulo signifas ke  tiuj institucioj kaj personoj, samkiel ties familianoj ne povos eniri la ?inan teritorion. La entreprenoj kaj organizoj ali?intaj al tiuj, anka? havas malpermeson por negoci kun ?inio.

 “?inio estas firme decidita savgardi sian suverenon nacian, sian sekurecon kaj siajn evolu-interesojn, kaj avertas al la brita flanko ke ?i ne plu trairu eraran vojon”, asertis la ministerio. “Kontra?e, ?inio reagos kun determino”, li aldonis.

Dume, Britio akuzis la azian giganton uzi la punojn por ataki siajn kritikantojn kaj petis al Pekino doni aliron al la Zono en UN”.

Pasintlunde, la E?ropa Unio, Usono, Kanado kaj Britio punis kelkajn ?inajn funkciulojn kaj instituciojn, kiujn ili akuzis pri supozataj perfortoj de homaj rajtoj kontra? la islama minoritato “uigur” en la regiono de Xinjiang. La saman tagon Pekino respondis per simila punregulo kontra? la E?ropa Unio, e? kontra?  pli granda nombro da personoj kaj institucioj.

fonto: RT

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/252005-cinio-anoncis-punojn-por-homoj-kaj-entreprenoj-britaj

**Radio Habana Cuba**